



jack london

KONSTRUI
FAJRON

Esperantigis
D.C.

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1984 * 4 FF

— SAT —
broŝurservo



Jack London surŝipe

Kelkaj vortoj pri

JACK LONDON

Jack London naskiĝis en San-Francisko en 1876.

Lia patro praktikis en Kalifornio la kaptilistan metion.

Inter liaj prapatroj oni trovas Anglojn, Kimrojn, Nederlandanojn, Svisojn, Francojn kaj Germanojn. Ĉiuj iam estis fortikuloj multimaj kaj harditaj, homoj agemaj kaj aventuremaj, kiuj, lacaj de la Malnova Mondo, venis trans Atlantiko por sciigi pri la vivosenco kaj serĉi pli bonan sorton.

Ankoraŭ eta infano Jack London devis dungigi en farmoj kiel brutgardisto. Tamen liaj gepatroj sendis lin kelkan tempon en la lernejon. "La lernantoj, li rakontis poste, sidis en la klasĉambro, ĉiu antaŭ pupitro. Sed la magistro plej ofte estis ebria. Tiam ĉiuj staris kaj la plej aĝaj el ni batis la magistron. Tiu ĉi sin venĝis kontraŭ la plej junaj kaj draŝis ilin per tiom da batoj, kiom li mem antaŭe ricevis."

En tiu stranga lernejo la infano tamen lernis legi kaj skribi. Dum siaj liberhoroj li vorlegis la librojn, kiuj falis sub liajn manojn, kaj li diris al ni pli poste kian profundan impreson lia juna imago ricevis de la Rakontoj de Alhambro de Washington Irving.

Jack London estis dekunujara, kiam liaj gepatroj forlasis la ranĉon por la urbo Oaklando ĉe Pacifiko.

La materiala premateco kaj la demono de la aventuroj faris al li strangan ekzistadon. Oni vidis lin sinsekve surstrata gazetvendisto, fiŝkaptisto, ŝipano, fiŝgardisto, dokisto. Li praktikis tiujn diversajn metiojn kun senŝanĝa bonhumoro. "Nekonceptebla estas la orgojlo, kiun liveris al mi bone plenumita labortago."

Malgraŭ la laciĝoj kaj la mankoj, Jack London ne perdis la instruoguston. Li asidue vizitis la publikajn bibliotekojn feliĉe senpagajn. Li ekprovis verkadon, kaj gazeto de San-Francisko iam kronis la novelon,

kiun li estis sendinta por konkurso : "Tajfuno fronte al la japana marbordo".

Tiu unua literatura sukceso bedaŭrinde restis sensekva. Jack London, pormomente naŭzita de la literaturo, foriris por granda vojaĝo, kiu kondukis lin al Bostono kaj Kanado.

En 1895 oni retrovas lin pordisto de la duagrada Lernejo en Oaklando. Samtempe li kunlaboras en la literatura bulteno tiulerneja kaj tie publikigas siajn unuajn rakontojn. Tiaj aferoj evidente videblas nur en Ameriko.

Post unu jaro, laca de la pordista metio, Jack London forlasas Oaklandon por San-Francisko. Tie li enskribiĝas ĉe la Universitato kaj perlaboras sian panon en lavbutiko.

La metio estas peniga, la studoj ja malfacilaj, kaj Jack London rakontis, kiel li devis streĉi sian volon por teni siajn okulojn malfermitaj super libro, kiam li eniris sian mizeran ĉambron post dekduhoraj labortagoj. Tial oni ne surpriziĝas vidi lin forlasi la Universitaton kaj la lavbutikon de San-Francisko. Estas tiam la epoko de la granda impeto al la oro. Jack London foriras al Klondiko, tro malfrue, ve! por kapti fortunon. Li almenaŭ eskapas el terura skorbuta epidemio, kaj jen li denove en Oaklando.

Vere komenciĝas tiuepoke lia verkista kariero. Jack London post pluraj fiaskoj sukcesis akceptigi unu rakonton fare de magazino, kiu pagis al li 40 dolarojn. Ekestas la riĉeco. "Fariĝis probable, skribas li mem, ke mi ne plu bezonos, almenaŭ kelkan tempon, malŝargi karbon."

En 1900 aperis lia unua verko, rakontaro el Klondiko: "La Lupido".

Jack London tiam estis dudekkvarjara. Liaj portretoj lin montras bela knabo potence ŝultrolarĝa, kun okuloj flamaj pro inteligenteco kaj bonkoreco, kun elstara mentono energia kaj volema.

Tiu fortika knabego estis antaŭtempe forpasonta, en 1916, en la aĝo de kvardek jaroj.

Lia mallonga kariero estis ege fekunda. Jack London, instalita en la kamparo, partigis sian tempon inter la sportoj, la ĉevalrajdado kaj sia verkista metio. Li multe kaj tre metode laboris. En dek ses jaroj

li publikigis ne malpli ol kvindek romanojn.

Malmultaj vivoj estis tiom riĉaj je lukto, aventuro kaj laboro; malmultaj literaturaj verkaroj tiel sincere spegulas la homon.

Oni tial trovas en ĉiuj verkoj de Jack London tiun fortan verakcenton, tiun korjunecon, tiun akraguston de la fortika kaj triumfa vivo, kiuj faras en la tuta mondo la Usonan romaniston unu el la preferataj aŭtoroj de la novaj generacioj.

Paul Gruyer kaj Louis Postif
1929.

KONSTRUI FAJRON

La ektagiĝo estas malvarma kaj griza, tre griza kaj tre malvarma, kiam la viro, forlasante la larĝan strek-aĵon desegnititan de la frostiĝinta Jukono, suriras la altaĵon, kiu staras sur unu el la bordoj de la ĉefrivero, kaj kie konfuze desegniĝas mallarĝa vojstreko iranta orienten tra densa abiegejo.

La altaĵo estas apika. Alveninte ĉe la supro, la viro paŭzas por reakiri spiron; poste, li maŝine rigardas sian horloĝon. Ĝi signas la naŭan.

Ne estas suno, eĉ ne iomete da suno, kvankam neniu nuboj ŝvebas en la ĉielo.

La firmamento estas pura, kaj tamen nepenetrebila vualo ŝajnas etendiĝi sur ĉiuj aĵoj. Fajna kaj subtila tenebro, kiu ne estas la nokto sed foresto de la suno, moderigas la taglumon kaj ĝin obskurigas.

La viro ne maltrankviliĝas pro tio. Li ne ekvidis la sunon jam de multaj semajnoj. Li scias, ke ankoraŭ multaj devos forpasi antaŭ ol la ĝoja globo, rompante la longan polusan nokton, ekemergiĝos sude, unue dum kelkaj sekundoj, super la horizonto-linio.

Sed, turnante sin, la viro retrorigardas al la longa vojstreko, kiun li ĵus laŭiris. Sub li etendiĝas Jukono unu mejlon larĝa kaj kaptita sub tri futoj da glacio. Kaj tiun glacieron mem superkovras tri futoj da neĝo. La neĝo, senmakula, ondiĝas en molaj ondomovoj tie, kie ĝi kovras la ĥaosajn blokojn, kiuj formiĝis, kiam frostiĝis la rivero. Norden kaj suden, tiel foren kiel povas la okulo porti la rigardon, etendiĝas tiu senlima blankaĵo, sur kiu grizeta linio hare maldika serpentas, ĉirkaŭirante la de nigraj abioj kovritajn insulojn, kiuj girlandas sur la rivero.

Tiun nepercepteblan strekon ĵus laŭiris la viro; ĝi estas la konata vojstreko kiu, kvin cent mejlojn longa direkte al la sudo, kondukas al la pasejoj de la rivero Chilcoot, al Dyea kaj al Pacifiko. La rivera vojstreko kondukas norden al Dawson dista je sepdek mejloj, kaj, mejlojn post mejloj, al la Beringa Markolo kaj

Fuorto Miĥaelo sur la Polusa Maro*.

Sed nek la mistera linio de la fora horizonto, nek la foresto de la suno, nek tiu tuta etoso el fantasta senviveco perturbas la viron pli ol necese.

Ne ĉar li estas plene satiĝinta de tiu spektaklo. Li estas novveninto, iu "Chechaquo", kaj li unuafoje travintras sur la Norda Tero**. Sed nenia superflua imago ĵetas timon en lian cerbon. Kun energia kaj neta spirito li ne malfruiĝas por filozofi pri la realaĵoj. Fronte al la impona naturo, kiu lin premas, li ne meditas pri la fragileco de la homa estaĵo, pri la loko al ĝi atribuita en la universo, pri la ekstremaj limoj de la varmo kaj malvarmo, kiuj ebligas al ĝi tie vivi, aŭ ĝin kondamnas tie morti, kaj se ĝi mortfalas, pri la senmorteco de ĝia animo. Kvindek gradoj sub nulo ne impresas lin pli ol okdekgradoj***. Lia nura intereso en tia malvarmo kuŝas en tio, ke li estas pro tiu ĝenata. La frosta mordo dolorigas, kaj gravas sin antaŭŝirmi kontraŭ ĝi, enŝovante siajn manojn en dikajn mufgantojn, mallevente sur siajn orelojn la kaskedklapojn, protektante siajn krurojn kaj piedojn en ŝtrumpoj kaj dikaj mokasenoj. Kvindek gradoj sub nulo estas fakto, kaj nenio pli.

Do, denove turnante la dorson al Jukono, li pretiĝas por pluri sian vojon. Por informiĝi pri la proksimuma intenso de la malvarmo, li kraĉas. Li aŭdas etan bruon similan al eksplodeto. Kio iom ekstremigas lin. Li refoje kraĉas, kaj duafoje, antaŭ ol fali sur la neĝon, la salivo klakas en la aero.

La viro scias ke, je kvindek gradoj sub nulo, la salivo klakas, kiam ĝi atingas la grundon. Sed, ĉar ĝi tiel eksplodis en la aero, la malvarmo sen ia dubo transpasas kvindek gradojn. Ĝis kiom? Tion li ne scias. Kaj se

* Dawson estas unu el la mincentroj de Klondiko kaj la lando de l'oro. La Fuorto Sankta-Miĥaelo situas en Alasko ĉe la Golfo de Norton, kiu malfermiĝas inter la maro kaj la Beringa Markolo.

** En "White-Fang" Jack London sciigas nin ke : "...la kelkaj blankuloj, kiuj troviĝis en Fuorto-Jukono kromnomis sin mem kun orgojlo Sour-Doughs, aŭ Acidaj Pastoj, ĉar ili preparis sen gisto panon iom acidetan. Ili montris nur malŝaton por la aliaj per vaporŝipoj alkondukitaj blankuloj, kiujn ili nomis "Chechaquo", ĉar ĉi tiuj male ŝveligis sian panon por ĝin kuiri.

*** Ni memoru, ke ĉi tie temas pri Farenhejtaj gradoj.

Ĉion konsideri, per kio tio tuŝas lin?

Kio nur interesas lin, tio estas sen malhelpo reatingi aliajn homojn, kiuj atendas lin sur la maldekstra brako de Henderson-Creek, alfluanteto de Jukono, kie troviĝas ilia "claim"*

La kamaradoj atingis rekte la celon laŭ mallongiga vojstreko, dum li mem sin deturnis de sia vojo por esplori la Jukono-Valon, kaj sciiĝi ĉu la abiaroj de ties insuloj kaj bordoj liveros, en la venonta printempo, rondligojn kun taŭga dimensio por la ekspluatado de la mino. Laŭ siaj kalkuloj li reatingos siajn kompanojn ĉe la kampadejo ĉirkaŭ la sesa vespere. Jam noktigo. Sed li retroviĝos en societo, ĝoja fajro kraketos, kaj lin atendos bongusta kaj varmega vespermanĝo. Koncerne la tagmanĝon, li kunportas la necesajon. Pri tio pensante, li metas la manon sur dikan tuberon, kiu elstaras sub lia vesto. Tie, sub la ĉemizo, sur lia haŭto mem, estas paketo da biskvitoj envolvitaj en poŝtuko. Ĝi estas la sola rimedo por malebligi frostiĝon de la biskvitoj. Li ridetas al si mem, pensante ke ĉiu el tiuj biskvitoj estas trempita en fumaĵita lardo antaŭe fandita, kaj enfermas, kiel sandviĉo inter siaj du kunigitaj pecoj, rostitan tranĉaĵon el tiu sama bonega lardo.

La viro rapidiras sub la altajn abiojn. La vojstreko, kiun li sekvas, estas apenaŭ videbla. Tavolo da neĝo falis de post la pasado de la lasta sledo, kaj li ĝojas piediri, malpeze, sen alia ŝarĝo ol sia tagmanĝo en sia ĉemizo.

Tia malvarmo tamen lin surprizas. Per sia mano, sen eligi ĝin el la mufganto, li frotas al si la nazon kaj la elstaradon de siaj vangostoj. Rufa, abunda barbo enkadrigas lian tutan vizaĝon. Sed la densaj haroj ne ŝirmas la elstarajn vangostojn nek la nazon, kiu samkiel kabo agreseme sin ĵetas antaŭen en la glacian aeron.

Kun la nazo ĉe la kalkanumoj de la viro troas hundo, enorma "husky" de la regiono, tipo de la vera luphundo kun griza robo, kaj kies naturo kaj aspekto ŝajnas nemulte diferenci de tiuj de ĝia frato, la sovaĝa lupo. La besto estas deprimita pro la eksterordinara malvarmo. Ĝi scias, ke tia vetero ne taŭgas por vojaĝi. Ĝi estas

* claim : ekspluatata parcelo atribuita al skipo el orserĉistoj.

pri tio avertita de sia instinkto pli certe ol la homo per la rezonado. Efektive, se la homo havus termometro, ne kvindek gradojn, nek sesdek, nek sepdek, sed sepdek kvin sub la glaciiga punkto montrus la aparato.

La hundo ja nenion scias pri la termometroj. Ĝia nocio pri malvarmo ne havas la precizecon de la homaj kalkuloj. Sed en ĝia rudimenta cerbo naskiĝas svaga timo, kiu ĝin premezas sub sia minaco. La besto angorplena silente sin ŝovas malantaŭ la viro, arde demanda pri ĉiuj liaj gestoj, kvazaŭ ĝi esperus ĉiumomente vidi lin retropaŝi al la lasta kampadejo aŭ, haltante, serĉi ie ŝirmilon por tie konstrui fajron. La "husky" konas la necescon de fajro en tia malvarmo. En foresto de la bonfara flamo, ĝi dezirus almenaŭ fosi al si truon en la neĝo por tie kaŭriĝi, ŝirmite kontraŭ la aero. Ĝia glaciiginta spiraĵo pudris per blanka kaj kristala prujno ĝiajn pendvangojn, ĝiajn brovojn, ĝian muzelon.

Ankaŭ la rufa barbo de la viro kaj liaj lipharoj estas glaciigitaj, sed pli firme. La prujnokovraĵo tie transformiĝas en glacikovraĵon, kies dikeco pliiĝas je ĉiu ekblovo de la humida kaj varmeta spiraĵo, kiun li ellasas. La viro, krome, tabakmaĉas, kaj la muzelingo el glacio, kiu enfiksas liajn lipojn, igas ĉi tiujn tiel rigidaj, ke estas al li neeble ilin movi por kraci la tabaksukon. Tiel ke tiu ĉi, miksite al la salivo, fluetas sur lia barbo en brunete koloraj kaj sukcene malmolaj stalaktitoj, kies longo senĉese pliiĝas sub lia mentono.

Se la homo falus, lia barbo rompiĝus en pecojn. Sed li nemulte zorgas pri tiu apendico. Ĉiuj tabakmaĉantoj pagas al la frosto la saman tributon, en Nordlando. Jam dufoje li troviĝis ekstere kun frostosaltoj de kvindek kaj sesdek gradoj de la alkohola termometro, kaj la sama fenomeno produktiĝis.

La viro plue iras sian plurmejlan vojon tra vastaj plataj arbaroj. Li poste trairas grandan frostiĝintan marĉejon punktitan de bukedoj el nigraj arbustoj kaj, alvenante en valon, li malsupreniras ĝis la bordorando de glaciiginta akvoflueto. Ĝi estas Henderson Creek.

Li konsultas sian horloĝon. La dekan. Li scias, ke li marŝas je horrapido kvarmejla, kaj el tio konkludas, ke li duonhoron post tagmezo alvenos al la unua river-

brako ankoraŭ dek mejlojn dista. Li decidas ke, por festi tiun feliĉan eventon, alveninte al tiu punkto, li tagmanĝos.

La hundo, senkuraĝigite, kun la vosto pendanta inter la kruroj, reprenas sian lokon malantaŭ la kalkanumoj de sia mastro, kiu, kun sia marŝado iome balanciĝa, eklaŭiras la riverfluejon. Pli profunda, la vojstreko lasita de la lastaj sledoj tie pasintaj, estas ankoraŭ videbla. Sed la neĝo kovris ĉian spuron de homaj paŝoj. Jam de unu monato neniu laŭiris ĉu ire, ĉu revene, la silentan valon.

La viro daŭre iras, regulpaŝe. Lia cerbo ne kirlas senutilajn pripensojn; li pensas pri nenio, krom pri sia tagmanĝo kies horo alproksimiĝas kaj pri tio ke je la sesa vespere li retrovos siajn kamaradojn. Li ankaŭ ne parolas pro la precipa kialo, ke estas neniu kun kiu ekkonversacii. Kaj cetere, se li volus paroli, li ne povus pro la glacia muzelingo, kiu fermas al li la buŝon. Li kontentigas sin regule maĉante sian tabakon kaj tiele pli longigante sian sukcecan barbon.

Iafoje venas al li la nura penso, ke estas efektive malvarme, ke neniam antaŭe li konis tian malvarmecon. Dum li paŝas, li aŭtomate frotas kun siaj mufgantoj, jen per unu mano, jen per la alia, siajn vangojn kaj nazon. Sed li vane frotas, la sangcirkulado ne ŝajnas reordiĝi. Tuj kiam li ĉesigas la frotadon, nazo kaj vangoj reinertiĝas.

Estas nun certe, kaj tion li konscias, ke lia vizaĝo parte frostiĝis. Kaj li bedaŭras, ke li ne fabrikis al si specialan maskon el ledo, tenatan per rimenoj, kiel tiu portata de Bud, lia kamarado, kiam la temperaturo malaltiĝas. Sed ba! la malfeliĉo ne estas konsiderinda. Havi frostiĝintajn nazon kaj vangojn estas ja ĉagrena, kaj poste tre doloriga. Sed oni ne pro tio mortas, kio estas la ĉefaĵo.

La viro iradas, kaj la nura prizorgo de lia indiferenta cerbo estas senpaŭze kaj tre atente observi la vojstrekon, la zigzagojn kaj kurbiĝojn de la glacia rivero, la amasojn el ŝtipoj kuntrenitaj de la printempaj inundoj, kaj kiuj hodiaŭ formas etajn neĝajn montetojn evitendajn. Li esplorrigardas la grundon preskaŭ ĉiufoje antaŭ ol tien meti la piedon. Kaj subite li forsaltas kiel ĉevalo, kiu ektimas, kaj, retroirante je kelkaj paŝoj, li diste ĉirkaŭiras la strekitan vojon.

La rivero estas plene frostiĝinta, ĝis sia fluejo. Li tion scias, kaj scias, ke neniu akvofluo povas konservi likva eĉ ne unu guton dum la arkta vintro.

Sed li scias ankaŭ, ke subteraj fontoj ŝprucas, bolante, el la altaĵaj flankoj, kaj boras al si vojon sub la neĝo por atingi sub la glacio la riverfluejon, kaj tie daŭrigi sian kuradon. La neĝo kaj glacio ilin ŝirmas kontraŭ la aera kontakto, kaj eĉ dum la plej akraj malvarmoj neniam frostiĝas tiaj fontoj. Ili estigas gravan danĝeron kaj konsistigas verajn enfalilojn.

La neĝa tavolo, kiu ilin kovras kaj kaŝas, estas iafoje nur tri celojn dika. Ankaŭ iafoje trifuta. Povas ankaŭ okazi, ke akvaj etendaĵoj kaj glacitavoloj supermetiĝas sub la neĝo. Tiel ke, se la supera karapaco disfalas, la subaj same farus, kaj kiu ajn falus en unun el tiaj kaptiloj, riskus troviĝi duonkorpe en la akvo.

Jen la kaŭzo de la teruro, kiu antaŭ momento ekkaptis la viron.

Li sentis la glacieron fleksiĝi sub siaj paŝoj kaj aŭdis sub si sinistran krakadon. Nu, havi sub tia temperaturo nur la piedojn malsekaj, povas kaŭzi gravajn kaj danĝerajn malagrableĵojn. La malplejo, kiu povus el tio rezulti por li, estus malfruigi sian vojaĝon, devigante lin konstrui fajron por povi sensuiĝi kaj sekigi antaŭ la flamo siajn ŝtrumpojn kaj mokasenojn.

La viro ĉesas marŝi dum unu momento, kaj observas la aspekton de la valo. Li konkludas, ke la fontoj certe venas de dekstre. Daŭrigante froti al si la nazon kaj vangojn por tien realfluigi la sangon, li reiras sian vojon pli maldekstre de la riverbordo. Li singarde iras, ĉiupaŝe provante per la piedo la solidecon de la glacio. Poste, la grundo ŝajnas fariĝi pli firma, kaj ŝajnas malaperi la danĝero. La viro prenas el unu el siaj poŝoj novan tabakmaĉaĵon, ĝin ŝovas inter siajn lipojn kaj, akcelante sian irrapidon, reprenas sian kvarmeĵlan hormarŝadon.

Dum la du sekvantaj horoj li ankoraŭ renkontas plurajn el tiuj enfaliloj. La neĝo, iom fleksiĝinta en tiuj lokoj, alprenis apartan kristalan aspekton, kiu avertas lin kontraŭ la danĝero.

Sed, ĉar iu pasejo aspektas pli suspektinda, li truddevigas la hundon marŝi antaŭ li. La besto, pli kaj pli proksima al liaj kalkanumoj, unue rezistas. Endas, ke la viro ĝin minacu kaj antaŭen puŝu. Kaj fakte

la hundo, post apenaŭ dudeko da paŝoj, subite enprofundiĝas kaj rulfalas en akvotruon. Ĝi vigle restariĝas sur siaj kruroj kaj foriras al pli solida grundo.

La kruroj de la hundo malsekiĝis kaj en la sama momento la akvo transformiĝis en glacieron.

La besto, delasinte sin sur la neĝon, tuj sin eklekas kaj, ĉar tiu operacio estas nesufiĉa, forigas per ekmordoj la glaciajn lamenojn, kiuj pendas de ĉiuj ĝiaj haroj. Mistera instinkto ordonas al ĝi tiel agi. La viro, kiu scias, ke la besto ne povos tiel daŭrigi sian vojon, venas al ĝi helpe. Li elirigas el la mufganto sian dekstran manon kaj ankaŭ li fortiras la glacierojn. Li elmetas al la aero ne pli ol unu minuton siajn fingrojn, kaj konsterniĝas pro la rapida rigidiĝo, kiu ilin kaptas. Jes ja, akre malvarmas. Li haste resurmetas sian mufganton kaj forte frapas la manon kontraŭ la bruston.

Je tagmezo la tagklareco atingas sian apogeon. La suno tamen, en sia vintra kurado, estas ĉe la sudo tro malproksime por ekaperi ĉe la arkta horizonto. La ĉielo estas daŭre pura kaj sennuba, kaj tamen la korpo de l'viro projekcias neniun ombron sur Hender-son Creek.

Duonhoron post tagmezo precize, la viro alvenas al la unua riverbrako. Li estas kontenta pri sia marŝo-rapido. Se li ĝin tenos, li certe estos je la sesa kuniĝanta kun la kamaradoj.

*

Li disbutonas sian jakon kaj ĉemizon por eltiri sian manĝon.

Tiu nepre necesa ago daŭris ne pli ol unu kvaronminuton. Sed tia eta tempopaso estas sufiĉa por ke refoje la sensenteco ekkaptu liajn fingrojn aere elmetitajn. Li tamen rezistas kaj, sen resurmeti sian mufganton, dekdufoje li kun energio frapas siajn fingrojn kontraŭ sian kruron. Poste li sidiĝas sur arbostumpon kovritan de neĝo, por manĝi.

Unuatempe, viva piko sentiĝas en siaj fingroj, dum li ilin batas sur sian kruron. Poste, tiel abrupte tia piko ĉesas, ke li miras. La fingroj estas kvazaŭ sensentaj, kaj li ankoraŭ ne sukcesis porti ĝis siaj lipoj la biskviton kaj tiun mordi.

Li ree frapas siajn fingrojn kontraŭ sian suron, plurfoje,

kaj reenigante ilin en sian mufganton, malkovras sian alian manon. Per tiu ĉi li haste levas la biskviton ĝis sia buŝo. Sed lia buŝo estas fermita de la glacia muzelingo, kiu kunigas lian barbon kun liaj lipharoj, kaj li vane penas krakmanĝi iometon da nutraĵo.

Li forgesis konstrui fajron por sin degeli. Kaj je tiu penso, kiu subite venas al li, li ekridaĉas pensante, kiom li estas stulta.

Sed, dum li rikanas, li rimarkas, ke la fingroj de lia maldekstra mano, plu elmetataj al la aero, sensentiĝas samkiel, antaŭ momento, tiuj de lia dekstra mano. Li rimarkas ankaŭ, ke malaperis la piko, kiun, sidigante, li sentis je siaj du piedfingroj. Ĉu la varmo revenis, aŭ ĉu tio estas la pliigita efiko de la malvarmo? Li metas al si la demandon. Li movas siajn piedojn en siaj mokasenoj; la du piedfingroj estas sensentaj. Li haste remetas sian maldekstran manon en la mufganton kaj stariĝas, tamen iom timigita. Li piedfrapas, ĝis li denove sentas pikon en la piedfingroj.

Estas malvarme, evidente, tre malvarme.

La olda bravulo, kiu havas sian kabanon sur Sulphur Creek* kaj kun kiu li parolis antaŭ ol ekiri, ne mensogis, dirante kiom malvarmas iafoje en la lando. Tiam, li primokis lin! Tio pravas, ke oni devas neniam senkonsidere prijuĝi, kion oni nescias. Ne erareble : **estas malvarme.** Kaj la viro plu marŝas ire kaj revene, piedfrapas, brakbatas ĝis, fine, la sangcirkulado reordiĝas, kaj li trankviliĝas.

Tiam, li entreprenas konstrui sian fajron.

Sub la veproj, kiuj borderas la riveron kaj kie la lastprintempa elbordiĝo amase alportis branĉetaĵojn hodiaŭ sekigitajn, li trovas la necesan lignon. Li zorge starigas etan fajrejon, kaj tiras el sia poŝo alumeton, kaj samtempe betulŝelon sur kiu li ĝin frotas. La betulaĵo ekflamas ankoraŭ pli rapide ol tion farus papero, kaj la fajro elsaltas, siblante. La viro, kurbiĝante al la flamo, fandigas la glacieron, kiu kovras lian vizaĝon. Poste, antaŭ la bonfara varmo, li elirigas siajn manojn el la mufgantoj, kaj sin riskas manĝi siajn biskvitojn. Li regas la malvarmon. Ankaŭ la hundo estas kontenta; ĝi sterniĝas tute apud la fajro, kiel eble plej apude sen rufbruligi al si la harojn.

* Rivero de la Sulfuro

Kiam finita la manĝado, la viro plenŝtopas sian pipon, kaj ĝin fumas trankvile. Poste li resurŝovas siajn mufgantojn, mallevas sian kaskedon sur siajn orelojn kaj reiras la vojstrekon sur la maldekstra brako de Henderson Creek.

La hundo, ĉagrenite, malvolonte forlasas la fajron. Tiu viro, ĝi pensas, neniel scias, kio estas malvarmo. Efektive, neniu prapatra atavismo encerbigis al la homo la nocion pri malvarmo, pri vera malvarmo, pri malvarmo je cent sep gradoj sub nulo. Ne same estas kun la hundo. Prapatroj ĝiaj transdonis al ĝi sian sperton. Ĝi scias, ke estas malbone sin riski foren sub tia temperaturo. Estas, tute male, oportune dolĉmole kuŝiĝi funde de truo, en la neĝo, kaj atendi, por eliri, ke nubkurteno, etendiĝante inter tero kaj ĉielo, baru la atmosferan radiadon, de kiu venas tiu granda malvarmo.

Ekzistas inter la hundo kaj ties kunulo nenia sentimenta intimeco. Unu estas la sklavo de la alia. La nura kareso, kiun ĝi ricevas de li, estas tiu de la vipŝnuro, kaj ĉiuj mildaj vortoj, kiujn ĝi konas, estas la gorgbruoj, raukaj kaj minacaj, anoncantaj la batojn.

Tial la hundo, eĉ se ĝi havus por tio la rimedojn, neniel klopodus komuniki al sia kunulo sian antaŭtimon. La bonstato de la viro neniel ĝin interesas, kaj nur por si mem ĝi deziras restadi apud la fajro. Sed la viro fajfas, kaj parolas al la hundo per vipklako. La hundo relokigaĉas ĉe la kalkanumoj de sia mastro, kaj plu sekvas lin.

La marŝanto renovigas sian tabakmaĉaĵon. La sukkena barbo reekformiĝas, dum lia frostiĝanta spiraĵo ne malpli rapide surŝutetas per prujno liajn lipharojn, brovojn kaj okulharojn.

Sur la maldekstra brako de Henderson Creek la fontoj ŝajnas malpli multaj, kaj dum duonhoru la viro ekvidas de ili nenian indicon.

Kaj la evento okazas. En ian lokon, kiu montras nenian suspektindan signon, kie la neĝo, regula kaj glata, ŝajnas indiki suban grundon solidan, la viro eniĝas. La truo ne estas profunda, kaj li eltruiĝas malsekiĝinte nur ĝis la duono de la suroj.

Li tamen estas kolerega, kaj kiam li retroviĝas sur la firma grundo, li furioziĝas kontraŭ sia malbona sorto. Li esperis atingi la kampadejon kaj rekuniĝi

kun siaj kamaradoj je la sesa. Tiu akcidento malfruigas lin je unu horo. Ĉar nova fajro estas konstruenda por sekigi siajn ŝuojn. Tio urĝe necesas sub tia malalta temperaturo, li ĝin tro bone scias.

Li do sin direktas al la rivera bordodeklivo, kiun li suriras. Feliĉe svarmas la ligno. Ankaŭ tie la abundaj printempaj akvoj amasigis mortan lignon. Estas fajnaj sekaj herboj kaj etaj branĉetaĵoj, kaj ankaŭ amasoj da branĉoj kaj ŝtipoj ĉiudimensiaj. Li komencas, sternante kaj ordigante ioman nombron da dikaj ŝtipoj por servi kiel fajrujo kaj malebligi al la juna flamo sinki en la fanditan neĝon. Kaj li faras kiel antaŭe, frotante alumeton sur peceto da betuŝelo, kaj nutrante la flamon unue per tufoj el sekigitaj herboj kaj branĉetaĵoj.

Kaŭrante sur la neĝo, la viro procedas metode kaj senhaste, kun plena konscio pri la danĝero, kiun li riskas. Grade, laŭmezure kiel ĝi altiĝas, li ĵetas al la flamo pecetojn da ligno pli kaj pli dikajn. Li estas certa tiele sukcesi. Kaj sukcesi estas io nepra. Kiam la termometro montras cent sep sub nulo, gravas ne kulpi mallertaĵon, konstruante sian fajron, precipe kun malsekaj piedoj. Kun piedoj sekaj, se oni fiaskas, sufiĉas por ilin revarmigi, kuri duonmejlon sur la vojstreko. Sed sub tia temperaturo, kiam la piedoj estas malsekaj kaj frostiĝantaj, la procedo estas neaplikenda. Ĉar ju pli rapida la kurado, despli forta la piedfrostiĝo.

Ĉion ĉi la viro scias. La olda patro en sia kabano sur Sulphur Creek avertis lin pri tio, kaj nun li aprecas liajn konsilojn. Li jam ne plu sentas siajn piedfingrojn kaj, ĉar li devis, por konstrui sian fajron, denove eligi siajn manojn el la mufgantoj, ankaŭ liaj manfingroj ekfrostiĝas.

Tiel longe dum li marŝis je hora irrapido kvarmejlaj, la sangcirkulado normale plenumiĝis. Sed, en la preciza momento kiam li haltis, la sango same faris. Samkiel la hundo, la sango timas la malvarmon kaj sin kaŝas, forfluante for de la neŝirmitaj ekstremaĵoj de la homa korpo por retiriĝi en la plejprofundon de lia estaĵo. La viro sentas, sur la tuta surfaco de la korpo, sian haŭton malvarmiĝi. Sed la vivo en li ne estas difektita. La fajro komencas belege flami. Alproksimiĝas la momento, kiam li povos ĝin nutri per dikaj ŝtipoj.

Tiam li demetos siajn ŝuojn, kaj dum tiuj sekiĝos, li revarmigis siajn piedojn ĉe la ardejo, ne sen esti antaŭe, laŭ la kutima rito, ilin frotinta per neĝo. Ne, lia vivo ne estas difektita. Li pensas pri la olda patro, sur Sulphur Creek, kaj ridetas.

La avo tre serioze raportis al li, ke neniu homo en Klondiko devas sin riski vojaĝi sola trans kvindek gradoj sub nulo. Tio estas leĝo absoluta.

Kaj tamen li estas, li, ĉi tie. Ekokazis akcidento kaj, kvankam tutsola, li saviĝis. Tiuj maljunuloj, - ne ĉiuj, sed iuj inter ili - havas virinajn animojn. La ĉefaĵo estas konservi siajn ideojn netaj. Tiam, ĉio iras glate. Homo, inda je tiu nomo, devas povi vojaĝi sola.

Tamen, estas mirige, ke liaj fingroj tiel rapide ree sensentiĝis. Li apenaŭ povis kapti branĉetaĵon. La fingroj ŝajnis ne plu esti parto de lia korpo. Kiam ili prenis ion, liaj okuloj devis kontroli, ĉu ili ĝin tenas aŭ ne.

Sed per kio tio gravas! Ankaŭ la fajro ĉi tie estas, klakanta kaj krakanta, kaj ĉiu el ĝiaj flamoj, kiuj dancas en la frosta aero, estas vivo.

La viro sidiĝas por mallaĉi siajn mokasenojn. Tiuj estas kovritaj de glacia krusto. La dikaj ŝtrumpoj germane fabrikitaj, kiuj ĉirkaŭpremas la surojn, estas rigidaj kiel ŝtalaj ingoj. Ankaŭ la mokasenoj laĉoj similas ŝtalajn fadenojn tute nigrain kaj torditajn, kvazaŭ ili estus trapasintaj ian incendion. Li tiras ilin dum momento per siaj rigidaj fingroj. Kaj, ekkonsciante, ke tiel li serĉas la neebilon, li tiras sian tranĉilon el ties ingo. Sed antaŭ ol li povas tranĉi la laĉojn, la dua evento okazas.

Pri ĝi kulpas la viro. Li faris gravan eraron, starigante sian fajron sub abio. Fajro devas esti neŝirmite konstruita. Sed la loko aspektis al li pli komforta.

Nu, la abio estas ĝis la supro ŝarĝita de dika karapaco neĝa. La vento jam de pluraj semajnoj ne blovas, la neĝo akumuligis, kaj ĉiu branĉo portas da ĝi ĉiom, kiom ĝi povas subteni. La viro, por ilin ĵeti sur sian ardejon, rompis kelkajn malalte lokitajn branĉojn, kaj tion farante, komunikis al la arbo nepercepteblan agitadon. Tiu ĉi tamen estis sufiĉa por rompi la ekvilibron de la neĝa tavolo kaj estigi la katastrofon.

Unue ĉe la supro de la arbo unu branĉo renversis

sian ŝarĝon da neĝo. La neĝo falis sur la suban branĉon, kiu siavice rulfaligis sian ŝarĝon. La ŝutado daŭris, silenta kaj rapida, de ŝtupo al ŝtupo. Poste, kiel unu bloko, la blanka lavango defalis sur la viron kaj ties fajron. El la ruĝbrila ardejo, la postan sekundon plu, restas nenio. Nenio plu, krom senforma lito el freŝa, sternita neĝo.

*

De tio[/] la viro estas terurita. Terurita kvazaŭ li ĵus aŭdus proklami sian kondamnon al morto.

Dum momento li restas kun okuloj fiksitaj al la loko de la malaperinta fajrejo. Kaj li denove sin regas kaj refariĝas tre kvieta.

Povas esti, ke la olda patro diris al li veron. Se li havus kun si kompanon sur la vojstreko, certe malplia estus la danĝero. Tiu kompano helpus lin por rekonstrui la fajron, kaj lia interveno ne estus superflua. Sed, ĉar li estas sola, ankaŭ sola li rekomencos la taskon. Kaj li bone avertite, li evitos similan katastrofon. Li eble perdos kelkajn piedfingrojn, kiuj finfrostiĝos antaŭ ol la dua fajro estos preta. Sed kion li povas kontraŭ tio?

Jen tio, kion li pensas. Tamen li ne malfruiĝas pro senutila cerbumado. Tiel ŝpinante tiajn pensojn, li reeklaboras.

Li starigas por sia fajro novan fundamenton ĉi-foje ne ŝirmitan tie, kie neniu perfida arbo surŝutos sian neĝon sur ĝin, por ĝin estingi. Poste li malsupreniras sur la bordodeklivon por tie kolekti sekan herbon kaj branĉetaĵojn.

Liaj fingroj tiom rigidiĝis, ke li ne povas ilin uzi por laŭspece elekti sian rikolton, kaj li devas preni egajn plenmanojn el ĉio intermiksita, trafita de lia mano. Li tiel rikoltas multajn putrintajn branĉetaĵojn kaj tufojn el verda musko, kiuj intermiksiĝas, kaj kiuj estus forigendaj. Sed fari pli, li ne povas.

Li procedas tiel metode kiel antaŭe, flankmetante la plej dikajn lignopecojn, por ilin uzi nur kiam la fajro ekflamos. Dume, la hundo, sidante sur sia postaĵo, fiksas sur li la rigardon kun arda avideco brilanta en ĝiaj pupiloj, ĉar la homo estas por ĝi la provizanto de fajro, de fajro kiu baldaŭ denove flamos.

Kiam finitaj tiuj preparoj, la viro serĉas en sia poŝo

alian lamemon el betuŝelo. Li scias, ke tiu lameno tie troviĝas, ĉar dum li traserĉadas en la ŝtofo, li efektive aŭdas la taŭzon de la ŝelo. Sed liaj fingroj nenion sentas, kaj spite siajn penojn li ne sukcesas ĝin ekkapti. Li ankaŭ konscias, ke dume, liaj piedoj plu frostiĝas. Je tiu ideo, li sentas sin premata de vera angoro. Sed li streĉas sian volon kaj konservas sian kvieton.

Helpe de siaj dentoj li resurmetas siajn mufgantojn, batas per la manoj kontraŭ siajn ripojn, svingas siajn brakojn antaŭen kaj reen. Poste li sidas kaj releviĝas. La hundo lin rigardas, interesata kaj scivola, ĉiam sidanta en la neĝo kun la vosto-harfasko volvita sur ĝiaj antaŭaj kruroj, la oreloj antaŭen pintantaj. La viro siaflanke, plu batante al si la flankojn kaj frapante siajn manojn, rigardas la hundon kaj envias la varman harkovrilon, kiun la naturo donis al la besto.

Tiom baraktinte, la viro fine perceptas, ke liaj fingroj resentebliĝas. Estas tiel bonfara piketado, kiu baldaŭ aliĝas en kruele brulan doloron, sed kiun li akceptas kun ĝojo. Li fortiras la mufganton de sia dekstra mano kaj refoje traserĉadas en sia poŝo, por tie preni la betuŝelon.

Li ne senpene sukcesas, kaj ekkaptas ankaŭ sian alumetpaketon. Sed la eksterordinara malvarmo jam forpelas la vivon de liaj fingroj.

Dum li klopodas disigi disde la aliaj unu alumeton, la tuta paketo falas en la neĝon. Li penas levpreni la sulfuritajn lignopecetojn. Vane. Liaj inertaj fingroj ne sukcesas ilin ekkapti.

Li forpelas el sia spirito la penson, ke liaj piedoj, lia nazo kaj liaj vangoj definitive finfrostiĝas, kaj per sia tuta animforto streĉas sian volon por la konkero de la alumetoj. Kun ekstremaj antaŭzorgoj li kliniĝas, anstataŭiĝas per la vidado la ne plu uzeblan tuŝosenton, kaj kondukas sian malfermitan manon super la amaseton. Tiam, li ĝin refermas. Aŭ pli verdire li strebas ĝin refermi. Ĉar la fingroj rifuzas obei. Inter ili kaj la volo la komunikado estas rompita.

Li resurmetas sian mufganton. Kaj per siaj du manoj tiel ŝirmitaj li surŝovas unujn sur la aliajn la lignopecetojn, ilin elprenas en siaj du polmoj, samkiel oni faras kun akvo, kiun oni volas trinki. Sed samtempe kunportante multe da neĝo.

Li levas la tuton al sia buŝo, kaj per violenta streĉo krakigante la glacian muzelingon, disigas siajn lipojn. Tiam enigante la malsupran makzelon, per la supra li penas disigi la alumetojn. Li sukcesas izoligi unun el ili, kiu falas teren. Li per tio ne multe progresas. Li havas bonegan ideon. Klinante sin super la alumeto, li ĝin prenas inter siaj dentoj kaj ĝin frotas laŭlonge de sia femuro. Post dudek senrezultaj provoj, li ĝin proksimigas al la betulŝelo. Sed la brulanta sulfuro leviĝas al lia nazo, kaj atingante la pulmojn, tusigas lin spasme. Li disigas la dentojn. La alumeto falas neĝen kaj estingiĝas.

La maljuna ulo de Sulphur Creek evidente pravis, pensas la viro, dum li sentas sin invadata de malespero, kiun li ankoraŭ regas. Trans kvindek gradoj sub nulo, oni ne vojaĝu sola.

Li tamen rekomencas per la samaj gestoj la mankaj brakbatojn. Sed ĉi-foje nenia vivosento manifestiĝas.

Subite demetante siajn mufgantojn per la dentoj, la viro malkovras siajn du manojn, inter ili ekkaptas la alumetpaketon. Liaj brakaj muskoloj, ankoraŭ ne frostiĝintaj, ebligis tiun duoblan movon. Poste, forte premante la du manojn, li frotas sur sia femuro la tutan paketon. Unika flamo elsaltas. La sepdek alumetoj ekflamas samtempe! Ne estas vento por ilin estingi kaj, flankmetante sian kapon por eviti la sufokadon de la flamanta sulfuro, la viro proksimigas tiun ardan fajron al la betulŝelo. Tiumomente ŝajnas al li, ke ĉe la polmoj li perceptas strangan impreson : Brulas lia karno.

Ĝi brulas sufiĉe profunde sub la epidermo, por ke li sentu la doloron. La doloro intensiĝas. Kaj la viro tamen ĝin elportas, tenante la fasketon el flamoj super la betulŝelo kuŝanta sur la neĝo. Sed tion li faras mallerte kaj la betulaĵo plu rifuzas ekflami, dum plu brulas la manoj de l' viro.

Fine, ne plu povante elteni, li ĉion ellasas. La alumetoj falas, kraketante, en la neĝon. Kelkaj tamen atingas la betulŝelon, kiu flamas.

Sur tiu flamo la viro eketendas siajn sekajn herbojn kaj etajn branĉetaĵojn. Li pli-malpli bone levprenas ilin inter la du polmoj de siaj manoj. Se li renkontas putrintan lignon aŭ muskon alteniĝantan al la branĉet-

aĵoj, li eliminis ilin per la dentoj. Ĉion ĉi tre mallerte, sed kun nelacigebla persisteco.

Tiu flamo vivu aŭ estingiĝu, tio signifas por li vivon aŭ morton. Li sentas la sangon pli kaj pli retiriĝi el la korpa ekstera parto, kaj de tio li sentas tremon, kiu nur pligravigas lian mallertecon.

Dika tufo el verda musko subite falas ĝuste sur la fajreton de l' viro. Per la fingraj ekstremaĵoj li penas ĝin forigi. Sed la tremado, kiu skuas lin tutan, estigas tro subitan movon, kiu delokas la fajran centron. Tiel ke sekaj herboj kaj branĉetaĵoj, disigitaj, ĉesas flami.

Li klopodas ilin rekunigi. Lia tremado superas lian volon. El la disaj etaj branĉetaĵoj leviĝas lasta fumo, kaj ĉio estingiĝas. La ekflamiganto de fajro fiaskis. Dum la viro ĉirkaŭen ŝetas apatian kaj svagan rigardon, liaj okuloj renkontas la hundon, kiu sin tenas antaŭ li, ĉiam sidantan en la neĝo sur la alia flanko de la ruinigita fajrejo. Ankaŭ la besto sentas sin invadita de la malvarmo. Ĝi rondiĝas la dorson kaj ĝin mallevas, hirtigante sian hararon, kaj por revarmigi siajn antaŭajn kruojn, ilin sinsekve levas, balanciĝante. Ne ĉesas tiu gimnastiko.

La vido al la hundo naskas en la kapo de l' viro sovaĝan ideon. Li rememoras al si la historion pri tiu vojaĝanto kiu, kaptita en neĝa ŝtormo, mortigis junan renkontitan virbovon, kaj kiu, ŝirmante sin en la varmaj internaĵoj, tiel saviĝis el la frostiĝo kaj morto. Li faros samkiel li. Li mortigos la hundon, poste enprofundigos en la ankoraŭ varman kadavron siajn manojn, ĝis estos malaperinta ties sensenteco. Tiam li strebos trovi iun alumeton en unu el siaj poŝoj kaj rekonstruos, triafoje, sian fajron.

Li parolas al la hundo kaj ĝin vokas. Sed lia voĉo estas tiom emociplena, tiom tremanta, ke la besto, kiu neniam aŭdis la mastron tiele paroli, ektimegas. Tiu voĉo kaŝas danĝeron. Kian? Ĝi nescias. Sed la danĝero estas certa, kaj la instinkto diras al ĝi, malfidi la homon.

Kun kuŝantaj oreloj kaj sen ĉesi rondigi la dorson kaj piedbati la grundon, la hundo rifuzas obei al la alvoko.

La viro tiam malleviĝas kaj surmane-surgenuje rampas al la animalo. La malfido de la hundo antaŭ tiu ne-

kutima pozo eĉ pli kreskas, kaj kun mordema mieno inside forŝoviĝas.

La viro releviĝas. Li volas ne perdi sian kvietecon. Li rigardas teren por certiĝi, ĉu li vere staras, ĉar li ne plu sentas siajn piedojn kaj ne povus diri, ĉu tiuj tuŝas la teron. La hundo tamen trankviliĝas, vidante sian mastron denove en vertikala pozicio. Kaj kiam ordona voĉo klakanta kiel vipŝnuro ĝin alparolas refoje, ĝi retrovas sian kutiman submetiĝon kaj alpaŝas.

Tuj kiam la hundo estas de li atingebla, la viro duonfreneza pro espero disetendas la brakojn kaj, malleviĝante, rapide tiujn ĵetas ĉirkaŭ la beston. Sed li forgesis siajn fingrojn, kiuj pli kaj pli frostiĝas. Vane li penas ilin kroĉi al la hundhararo, ili ne plu obeas lin.

La sceno tre rapide disvolviĝis kaj antaŭ ol povis eskapi la hundo; la viro firme ĝin tenas en siaj brakoj, kvazaŭ en tenpremilo. La animalo gruntas, ĝemas, baraktas. La viro sidante en la neĝo kun sia kaptito, ĝin tenas strikte premata kontraŭ lia korpo. Sed pli fari, li ne povas.

Li komprenas, ke li ne povos mortigi la hundon. Li por tio disponas nenian rimedon. Liaj senpovaj manoj ne ebligas al li elingigi kaj teni sian tranĉilon nek strangoli la beston. Li tiun liberigas. Per terureksalto la hundo fuĝas kun la vosto inter la kruroj, kaj plu gruntante. Post kvardeko da paŝoj, ĝi haltas, kun oreloj pintantaj antaŭen, observante tion, kio okazos. La viro rigardas siajn inertajn manojn. Ili pendas ekstreme de siaj brakoj komplete mortaj. Ili plu ekzistas por li nur per la vidado. Li simple ricevas iamomente la impreson pri du tre pezaj ŝarĝoj pendantaj de liaj pojnjoj.

*

Tiam, ia antaŭtimo de la morto, obskura, premanta, komencas kapti lin. Laŭmezure kiel li konscias, ke ne plu temas pri perdo de lia nazo, liaj manoj kaj piedoj, sed ke lia vivo mem estas riskata, lia timo pliiĝas. Li reiras al la riverfluejo kaj, ĉiam kuranta, resekvas la forlasitan vojstrekon. Ĉe liaj kalkanumoj, reguligante sian troton laŭ la irrapido de la mastro, la hundo reeskortas lin.

La viro blinde kuras, sen konscia celo, invadata de

teruro, kiun li neniam antaŭe konis. Li iras, sen ion vidi. Kaj iom post iom, dum li plugas la neĝon per siaj mokasenoj, li denove distingas la objektojn ĉirkaŭ si : la bordodeklivojn de la rivero, la malbone signitan vojstrekon, la senfoliajn poplojn kaj la nigrajn abiojn, kaj la ĉielon super sia kapo.

Ŝajnas al li, ke li sentas sin pli bone. La streĉa kurado revokis en lia korpo ian varmon. Se li povus sufiĉe longtempe kuri, li atingus la kampadejon kaj rekuniĝus kun tiuj, kiuj lin atendas. Tie, li estus bone flegata, kaj la kamaradoj savus el li tion, kio estas ankoraŭ ne tute frostiĝinta.

Sed alia penso ekestiĝas. Ne, ne, li neniam alvenos al la kampadejo... Tro da mejloj lin disigas de ĝi. Tro profunde la frostoj lin mordis. Li baldaŭ falos, rigide morta.

Tiun penson li strebas elpeli. Li rifuzas ĝin konsideri, ĝin alfronti. Sed, pli kaj pli korprema, ĝi trudiĝas, borpenetras en lin. Per siaj tutaj fortoj li ĝin forpuŝas, penante alion pripensi.

Ŝajnas al li ege strange, ke li povas tiel kuri sur piedoj tute frostiĝintaj. Tiom frostiĝintaj, ke li eĉ ne sentas ilin tuŝi la grundon, kvazaŭ lia korpo sur ili ne pezus. Li flugtuŝas la neĝon sen eksenti la kontakton. La viro iam vidis, en iu urbo, statuon de Flugilhava Merkuro. Li sin demandas, ĉu tiu Merkuro ricevis la saman impreson, kiun donas al li tiu flugtuŝo al la neĝa tapiŝo.

Ververe li estas freneza pretendante atingi la kampadejon tiel kurante. Kiel imagi, ke liaj malpliĝintaj fortoj ne perfidos lin?

Jam plurfoje li stumblis. Finfine li ŝancelas, kunstreĉas siajn muskolojn por refirmigi sian ekvilibron, kaj falas.

Vane penas la viro por releviĝi. Li estas tutelĉerpita. Li do eksidas sur la neĝo kaj decidas ripozi kelkan tempon antaŭ ol daŭrigi la vojaĝon; sed ĉi-foje ne kurante.

Dum li reakiras spiron, li konstatas ke, se liaj nazo, vangoj, piedoj, manoj plu restas sensentaj, bona kaj komforta varmo ardas en lia brusto. Kvankam agrabla, tiu impresio estas miriga. Post pripensoj li konkludas, ke la frostiĝo de lia korpo verŝajne etendiĝas. De la membraj ekstremaĵoj kaj de la membroj mem la

sango refluas al la brusto kaj al la koro.

Terura penso, kiun li penas retropuŝi kaj forgesi. Ĉar li ja sentas, ke ĝi sukcesus renaski en li la terurigon. Kaj pli ol ĉion, tion li timas. Sed la penso firmiĝas, obsedanta, kaj tiom persistas, ke li subite ricevas la vizion de sia korpo totale frostiĝinta.

Ja estas tro. Kvazaŭ movigite de risorto, li restariĝas kaj rekomencas sur la vojstreko sian frenezan kuradon. Li fulmmomente refoje sin regas. Li moderigas sian irrapidon kaj reekmarŝas por pli bone domaĝi siajn fortojn. Sed la vizio de lia tuta korpo frostiĝinta, preskaŭ tuj sin trudas al lia cerbo kaj igas lin denove kuri.

Malantaŭ li la hundo samrapide sekvas. Kiam la viro duafoje falas, la besto eksidas, kiel ĝi jam antaŭe faris, kun la vosto refaldita sur la kruroj, la okuloj ardaĵ kaj atentaj. La kvieto de la besto incitas la viron, kiu ĝin ekinsultas. La hundo nur mallevas iom la orelojn.

La viro frostotremas. Li estas videble perdanta la batalon; la frostoj penetras lian tutan korpon. Per lasta revigliĝo li ankoraŭfoje ekkuras. Sed li ne iras malproksimen. Du minutojn poste li ŝanceliĝas falas kun kapo antaŭen, sterniĝas sur la neĝo.

Estas unue stuporo. Kaj, tuj kiam li denove sin regas, la penso venas al li, ke li mortu kun digno. Li diras al si, ke li agis kiel senprudentulo. Li sin komparas al kokido, kiu, kun tranĉita kapo, daŭrigas movi la kruretojn. Jes, li faras ĉi tiun komparon!

Ĉar li estas kondamnita al frostiĝo, ĉar tio ĉi estas nepre neŝanĝebla, li ja povas dece akcepti la kruelan sperton. Granda paco rezultas por li el tiu decido, dum li sentas en si enŝoviĝi dormemon kaj ŝanceliĝi la kapon.

Finfine ĝi estas, li pensas, impresita delica endormiĝi en la morto. Kvazaŭ oni englutus anestezilon. La morto per glaciigo ne estas tiel terura kiel oni ĝin diras. Estas aliaj multe pli malbonaj manieroj morti. Halucino lin kaptas. Li vidas la kamaradojn serĉi, la morgaŭon, lian kadavron. Li esploras la vojstrekon kune kun ili, kaj sin serĉas mem. Kun ili li sekvas la glacian riverfluejon kaj subite, ĉe valkurbiĝo, li trovas sian korpon sternitan sur la neĝo. Kiam li revenos al Usono, li povos rakonti al la homoj, kio

estas vera malvarmo.

Kaj tiu vizio forviŝiĝas, anstataŭita de alia. Ĉi-foje li troviĝas kun la olda bravulo, kiu havas sian kabanon sur Sulphur Creek. Li vidas lin nete, en la varmo, komforta, fumanta sian pipon.

- Ci pravis, li murmuras... Ci pravis, olda patro... La viro tiam ekdormetas, en dormo kiu ŝajnas al li la plej bona, kiun li iam konis.

Sidante kontraŭ li, la hundo atendas. La mallonga lumtago mortiĝas en longa kaj grizeta krepusko. Neniu indico signas, ke la mastro pretiĝas por konstrui fajron. Ĝi pri tio miras en sia hunda cerbo. En ĝia kruda memoro nenio elvokas la bildon de homo sidanta, sen fajro, en la neĝo, sub tia temperaturo.

Kun la krepuskofino kaj la nokto, kiu invadas la ĉielon, la malvarmeco ankoraŭ pliiĝas. La hundo dolĉe ekĝemas kaj rekomencas movi siajn antaŭajn krurojn, dum ĝi mallevas la orelojn, ĉar ĝi timas skoldon de la viro, aŭ vipobaton.

Sed la viro ne moviĝas, nek parolas. La hundo pli laŭte ĝemas. Poste ĝi rampas al la mastro kaj flaras odoron de morto. Kun hirtaj haroj, ĝi retropaŝas. Ankoraŭ kelkajn momentojn ĝi restas sur tiu sama loko, hurlante al la steloj, kiuj tremlumas en la glacia aero. Poste ĝi returniĝas, kaj trote retroirante la vojstrekon, kiun ĝi sekvis kun la viro, ĝi iras renkonte al mastro alia, kiu ĝin provizos per nutraĵo, kaj ekflamigos fajron.
